

& Jam kreskas la semo!:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 470 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1920) "je l' memortago de Zamenhof". Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Infanoj ĉe montrofenestro".>

(#Melodio:

<1,5:47> (

/dododo dodo mimi dodo re|Ti; do TiTi dore mido TiLa SooSo;So dodo dodo mimi
dodo re3;Ti dodo TiTi dore mido Ti Ti;

(#Rekantaĵe: dodo TiTi doTi LaSo; mi rere miimifa somi fa mi; la lala soso fafa sofa
mi mi; fa mi; dodo TiTi doTi La So o)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Kun festa brul' en koro kaj oku2l' ;
Ni rompu muton de la tagoj grizaj, ;
Kaj ĝojsonor' de solenanta ĥor' ;
Anoncu finon de la tempoj krizaj!

(×: **Forto kreskas, adoleskas, ; fariĝas
granda rustika arbo ; Kiel ni semas,
tiel ni rikoltos ; florojn ; Forto
kreskas, adoleskas.**)

'2 La glora sem' ne kun timema trem', ;
Sed kreskas jam kun grandpromesa
forto! ; Trans mont' kaj mar' etendas sin
sen bar' ; Por ligi gentojn per potenc' de
Vorto.

'3 Sed antaŭ ol la verda fratpopol' ;
Ekĝojas pri la Estonteco flora, ; La
frata gent' kun la malnova sent' ; Sin
turnu al memor' de viro glora!

'4 Li estis vir' stampita de sopir', ;
Vidanto estis en la mondo blinda. ; Kaj
la sopir' per sia akra ŝir' ; Instigis lin
por faro admirinda.

'5 Per batalil', mortigoj mil kaj mil, ;
Herooj brilaj regis jam sur tero, ; Li
estis pli: la Amon portis li, ; Armilo lia
estis sinofero.

'6 Ho, milda kor', sed arda pro l' fervor'!
; De kie prenis vi la forton spitan, ; Ke
vi en sol' eĉ malgraŭ ĝia vol' ; Elsavi
provis mondon malbenitan!?

'7 Nek mok', nek rid', nek stulto, nek
perfid' ; Malhelpis vin en laborad'
modesta. ; Ho, hom-amant'! ne en fiera
vant', ; Sed en sufero estis vi majesta!

.....

'8 Ja en labor' la trostreĉita kor' ;
Rompiĝis antaŭ la triumfa celo, ; Sed
ĝia ve' el Mondo de Pere' ; Sin svingis
alten, supren ĝis ĉielo!

'9 La tomba sin' nun enfermanta vin ;
Por la adeptoj estas sankta templo, ;
Kaj por pilgrim' alflugas la anim'! ;
Inspiru ĝin, ho Majstro, per ekzemplo!

.....

'10 Ni sekvos vin, ĝis kiam venos fin' ;
Al mondkonfuzo, al terura farso, ; Kaj
via stel' per sia verda hel' ; Paligos
ruĝan lumon de la Marso!